

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2019

Jarkolekto 6 - Numero 4



Quinten Metsys (1466 - 1530)

Petegantaj farmistoj en la oficejo de impostkolektistoj

ENHAVOTABELO

de oktobro 2019

Titolpaĝo: <i>Quinten Metsys (1466 - 1530)</i>	
<i>Petegantaj farmistoj en la oficejo de impostkolektistoj</i>	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	4
<i>Radio Polonia Varsovio 1986</i>	
<i>Jubileomarŝo 1887 - 1987</i>	
<i>41a Universala Kongreso Kopenhago 1956</i>	
<i>37a Kongreso de IKUE 1977</i>	
<i>Esperanto-fonto en Hungario 1926 - 1966</i>	
Spikumajoj & suplementoj: En la iama domo de L.L. Zamenhof	11
Por spuremuloj!	13
Medalistoj: 18. Sándor Józai (°1943)	14
Aspektoj de numismatiko: Falsado de numismatikaĵoj	15
Terminaro: alfabeto listo (19)	18
Historiaj aspektoj: Esperanto - numismatiko en uniformo (3)	19
Numismatika Forumo: Ĉu oni reviziu la spesmilon?	23
El la gazetaro: La financa puĉo de Zuckerberg: LIBRA!.....	25
Retpoŝto	26
Anoncoj & eventoj	42

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: **www.ena.frali.bplaced.net**
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

Apenaŭ kredeble! Tamen nuda fakto. Antaŭ viaj okuloj troviĝas ĉi-momente la 24a numero de nia asocia revuo “Esperanta Numismatiko”, do la kvara de la sesa (!) jarkolekto.

Dum la tri pasintaj monatoj multaj el vi strebis kaj helpis diskonigi nian fakgrupon, por ke novaj membroj trovu la vojon al ankoraŭ malsufiĉe konata esperanta trezoro. Tiurilate ni volas emfazi la volontulan rolon por ENA de tri samideanoj, dumvivaj geaktivuloj, kiuj havas grandegajn meritojn kiel funkciuloj kaj eĉ (eks)estraranoj de UEA: Anna Löwenstein, Renato Corsetti (Britio) kaj Lee Jungkee (Koreio). Kiom aŭ kiel ili sukcesis influi la varbadon, ni ne povas ekzakte taksi, sed dum la lasta kvaronjaro la nombro de individuaj membroj mirinde rapide kreskis ĝis 132! Multan dankon ankaŭ al ĉiuj aliuloj, kiuj iel kontribuis al tiu rezulto! En la unua numero de la sepa jarkolekto ni pli detale emfazos la rezultojn de la laborjaro 2019 kaj la intencojn realigi ankoraŭ pli bonajn rezultojn dum la nova jaro.

En la aktuala numero la redakcio celas denove servi la legantaron per interesaj artikoloj. Krome pere de abundaj ilustraĵoj, por allogi scivolemulojn al (tra)legado. Viaj reagoj – kiel kutime – estos por la redakcio instigado, por daŭrigi la klopodojn plibonigi kaj plibeligi la revuon.

En nia pli grava rubriko “Moneroj kaj medaloj” ni denove montras kaj priskribas diverstipajn medalojn, tamen malofte jam pretajn por definitiva loko en la kompilenda Unua Katalogo. Tion montras la vorto “*serĉata*”, kiu indikas ke ofte estas granda problemo, malgraŭ regula kaj intenca tutmonda korespondado (vidu ankaŭ: “Retpoŝto”-n), trovi mankantajn informojn.

Kompreneble ni ankaŭ ree prezentas novan taskon por niaj spuremuloj, kiuj trovos en la koncerna rubriko novan, allogan defion.

En la rubriko “Spikumaĵoj...” ni vizitas la iaman domon de Zamenhof en Varsovio, por serĉi la ordenojn, monerojn, medalojn kaj aliajn historiajn memoraĵojn, iam donacitajn al Ludoviko, kiuj dum multaj jaroj havis propran lokon en speciala ŝranko en Ulica Zika n-ro 9.

Se vi ŝatus scii kiel efike falsi monerojn aŭ aliajn numismatikaĵojn, vi simple informiĝu en la rubriko “Aspektoj de numismatiko”. Por la ŝatantoj de historiaj faktoj, ni daŭrigas ŝerĉadi ligilojn inter militistoj en uniformo, Esperanto kaj numismatiko.

Se vi sekve ankoraŭ havus kuraĝon kaj intereson, vi povus konatiĝi en la samnoma rubriko kun plia eminenta medalisto, kiu kreis neordinaran esperantan medalon.

La unuan numeron de 2020 vi ricevos fine de januaro, do post la jarfinaj festoj. Tial ni jam nun deziras al vi ĉiuj, gekaruloj, PROSPERAN KAJ FELIĈIGAN NOVAN JARON!

Bert

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo D 1 - Unuflankaj medaloj

Radio Polonia Varsovio 1986



Lando: Pollando

Kvanto: “nur kelkaj ekzempleroj” (laŭ H. Jankowski)

Substancoj: bronzo aŭ argilo

Pezo: *serĉata*

Diametro: 71 mm

Medalisto: Janis Strupulis (Latvio)

Jaro: 1986

Diko: *serĉata*

Averso: (unuflanka medalo)

Ĉirkaŭskribo: “RADIO POLONIA VARSOVIO ESPERANTO - REDAKCIO”

Meze -supre: bildo laŭ statuo en Varsovio

-sube: “30 000a ELSENDO 26.VII 1986.”

Rimarko 1:

indas kompari ĝin kun la bildo de la sama statuo sur pola medalo okaze de la 72a UK de Esperanto, Varsovio 1987.

(vidu ankaŭ en jk.3 n-ro2, p.8)



Rimarko 2:

J. Strupulis faris du aliajn medalojn pri kaj por Radio Polonia. Unu el 1959 (ne jam priskribita!) kaj unu trovebla en jk.5 n-ro4, p.6.



Tipo G 1 - Ordenaspektaj medaloj

JUBILEOMARŜO 1887 – 1987



Lando: Danio

Kvanto: 200

Metaloj: latuno / nikelo

Pezo: 15 g

Diametro: 36 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 1997

Diko: 1,5 mm

Averso: (unuflanka)

Centre: verda stelo sur blanka fono

Ĉirkaŭskribo: ESPERANTO JUBILEOMARŜO (orkoloraj literoj)

Ambaŭflanke de la stelo: 1887 ★ 1987

Rimarko 1:

La 13an de septembro 1987 en Danio okazis jubilea marŝo memore al la centjara ekzisto de Esperanto. Ĉiu partopreninto ricevis tiun surhavigeblan medalon.

Rimarko 2:

Jen aldone ŝajne eluzita, vere probable malzorge konservita aŭ krude traktita ekzemplero. Ĉe moneroj ofte sufiĉe normala aspekto, ĉe medaloj ne, ĉar ili kutime ne cirkulas.



Fonto: Hans Jankowski: "Esperanto-medaloj 1912-1995", p.4 (DK 1)

Tipo D 1 - Unuflankaj medaloj

41a Universala Kongreso Kopenhago 1956



Lando: Danio

Kvanto: *serĉata*

Metalo: arĝentita surfaco

Pezo: 7,18 g

Diametro: 33 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 1956

Diko: 1 mm

Averso (unuflanka):

ĉirkaŭe: “41.a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO KOPENHAGO 1956”

meze: kronita blazono de la urbo Kopenhago kun sespinta steleto, luneto kaj tri turetoj

sube: verda stelo

Reverso:

nur mencio de la firmao - nomo MEKA. Jen sube ne-esperanta reklamĵetono kun la poŝta adreso de tiu emblemojn produktanta firmao.



Rimarko:



Jen la UK-glumarko kaj dekstre la urba blazono.



Tipo A 1 - Esperanto-medaloj

37a Kongreso de IKUE 1977



Lando: Pollando

Metaloj: arĝento aŭ bronzo

Diametro: *serĉata*

Jaro: 1977

Kvanto: *serĉata*

Pezo: *serĉata*

Medalisto: *serĉata*

Diko: *serĉata*

Averso:

Esperanto-stelo kun katolika kruco.

Ĉirkaŭa surskribo: ● 37-a KONGRESO de IKUE ● ĈENSTOĤOVO 17-21.08.1977.

En la suba duono de la medalo: abstrakta ornamaĵo.

Reverso:


bildoj de la Paŭlana Monaĥejo "Jasna Góra" kaj de la t.n. nigra madono de Ĉenstoĥovo.

Surskribo: "HELA MONTO"

Rimarko 1:

IKUE = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

Rimarko 2:



Ĉenstoŭovo estas famega pilgrimejo en la sudo de Pollando (Silezio). Ĝi estas konata pro ĝia madono kun infano, ambaŭ kun nigra haŭto. Tiu bildo estis kreita laŭ la tradicio kaj en la stilo de la bizanca regno.

Rimarko 3:

Jasna Góra signifas “Hela Monto”, tio estas “Monto de la lumo”. La monaĥejo troviĝas sur monteto en la okcidento de la urbo.



Rimarko 4:

Speciala porkongresa poŝta stampo



Tipo G 1 - Ordenaspektaj medaloj

Esperanto-fonto en Hungario 1926-1966



Lando: Hungario
Metaloj: arĝento / bronzo
Diametro: 36 mm
Jaro: 1966



Kvanto: *serĉata*
Pezo: 6,59 g (medalo)
8,58 g (tuto)
Medalisto: *serĉata*
Diko: 4 mm

Averso:

ĉirkaŭe: “ESPERANTO FONTO PILISCSÉV”

meze: verda stelo kun bildo de la komunuma fonto “Eszperantó”.

supre: 1926-1966 (40-jara jubileo)

Reverso:

ĉirkaŭe: UJPESTI TERMÉSZETBARÁTOK T.E.

meze en cirklo: silueto de la deklivoj de Piliŝo, la plej alta monto de la Piliŝ-montaro en Hungario; tri floretoj; bildo de amikeca manpremo.

sube: 1910-1966



kolora blazono

Rimarko 1:

la montrata medalo estis verŝfandita.

Rimarko 2:

UJPESTI TERMÉSZETBARÁTOK T.E. (= Turista Egyesülete)

Esperante: TURISMA ASOCIO de NATURAMIKOJ DE UJPEST

1916 > 50-jara jubileo de la asocio: 1966

Rimarko 3:

ESPERANTO-FONTO PILISCSÉV



Esperanto fonto de Naturamikoj. Hungario. Természet barátok „Esperanto forrása“. Csév.

Post la unua mondmilito hungaraj komunistoj sekrete kunvenis apud la fonto, kvazaŭ ili partoprenus en ekskurso. Sub preteksto lerni Esperanton, ili iĝis “laboristoj-esperantistoj”. Sekve ili donis al la fonto la nomon “Eszperantó” kaj tie sekve okazis pluraj kunvenoj de HESL (Hungara Esperantista Societo Laborista).

Posttempaj hungaraj esperantistoj surloke inaŭguris memorplaton en la jaro 1966, okaze de la UK en Budapeŝto. En 2012 la dume tute malzorgitan kaj eĉ parte detruitan iaman kunvenejon pluraj esperantistoj kaj aliaj volontuloj kaj lokaj gelernantoj restaŭris kaj ili al ĝi redonis la antaŭan pompon.

Ni kore dankas nian membron Marc Vanden Bempt pro la tradukado de artikoloj el la hungara.

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ


En la iama domo de L.L.Zamenhof



(Foto el "Enciklopedio de Esperanto K-Z")

Kie troviĝas la distingaĵoj de Zamenhof?

Dum la jubilea UK en Lille (Francio, 2017) ENA havis la okazon intervjui la nepon de Zamenhof, Louis Zaleski-Zamenhof kaj demandi al li, ĉu la distingaĵoj de lia avo troviĝas en iu muzeo. Li afable respondis, ke li en infanaĝo ofte vidis la ŝrankon, en kiu Ludoviko, sendube fiere, konservis tiujn historiajn objektojn, sed ke li nenion scias pri iu konservejo.



La nepo de Zamenhof

Pro la detruo de la domo, Zika n-ro 9, fare de la retiriĝantaj naziaj militistoj, intencantaj detrui la tutan urbon Varsovio, la ŝranko kun enhavo tre verŝajne malaperis sub la ruinoj. Kio okazis dum la posta ordigado kaj rekonstruado de la urbo, estas nebula paĝo en la historio de Esperanto. Inventaro de la enhavo ĝis nun ne estas trovita, do ni devas supozi, ke multaj objektoj estis detruitaj aŭ ŝtelitaj, i.a. la hispana kaj la franca ordenoj, pri kiuj ni jam informis

en nia revuo, krome la unika ora medalo de 50 spesmiloj, kiun Zamenhof ricevis en Krakovo en 1912 kaj arĝentaj moneroj de unu kaj du spesmiloj k.a. Ĉu iuj objektoj ankoraŭ ekzistas aŭ ne, tre verŝajne restos kompleta enigmo pro manko de inventaro...

Kio iam estis la domo de l' majstro

Zamenhofa Strato n-ro 9 en Varsovio: la domo, kie loĝis kaj laboris nia majstro. Nun nur ruinoj kaj ruboj. Kaj simile krias ruinoj kaj ruboj sian akuzon tra la tuta urbo. Akuzon mutan kaj tamen elokventan. Teruran akuzon kontraŭ barbareco kaj milito.



En la Zamenhofa festa tago ni prefere publikigus pli ĝojigan bildon. Sed la vundoj de la lasta hombestiĝo estas ankoraŭ tro freŝaj. Ni ankoraŭ ne kapablas sincere ĝoji, vid-al-vide kun la ruinoj, la freŝaj tomboj kaj la milionoj da viktimoj inter la samrasanoj de l' majstro kaj la cetera homaro.

Polaj samideanoj plantis sur la ruinojn de Zamenhofa 9 la verdan standardon. Simbolon de espero kaj fido je pli bona estonteco. Simbolon de amo kaj paco kaj de pli harmonia homaro. Kaj signon de la firma volo batali kaj bataladi tiel longe kaj tiel insiste kaj persiste, ĝis la bela revo de la majstro, kies loĝejon kaj laborejon ĉirkaŭis iam ĉi tiuj ŝtonoj nun rubiĝintaj, kaj la bela sonĝo de l' homaro “por eterna ben' efektiviĝos”.

(Teksto kaj foto el: “Heroldo de Esperanto”. 15 dec 1946)

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni ĝis hodiaŭ sciaspreskaŭ nenion.

12-a enigmo



25 x 16 mm

Alojo: arĝento (sterlinga): 92,5% Ag + 7,5% Cu, aŭ alia baza metalo

Firmao: L.G. BALFOUR CO, sidejo en Austin, Texas (Usono)

Bildelementoj: du anguliloj, gradarko kaj cirkelo

Krome: verdaj majuskloj AAE kaj verda steleto en blazonŝildeto

Ĉu AAE estis metia fakgrupo de esperantistoj-arkitektoj aŭ de esperantistoj-konstruistoj? Probable ne temas pri framasonoj...ĉu?

MEDALISTOJ

18. Sándor Józszai(°1943)



Józszai naskiĝis en 1943 en Békéscsaba (Hungario). Kvankam diverstalenta, li ĉefe famiĝis pro kreado de ikonoj, pentritaj sur ligno kun tradicia orkolora fono kaj kreitaj laŭ la antikva bizanca stilo. En 1981 li estis hazarde ekkoninta tiun tradicion de ikonografio kaj ortodoksa religio.

Post dek jaroj de studado kaj pentrado li unuafoje montris siajn ikonojn en Germanio. En 1992 sekvis ekspozicio en Hódmezővásárhely (Hungario). En plastikartaj kaj religiaj rondoj li baldaŭ havis multe da sukcesoj kaj ofte li estis instigata daŭrigi krei ikonojn.

En 1993, post ekspozicio en Germanio, li membriĝis en la “Internacia Ikona Amika Klubo de Hanovro”. Unu jaron poste eĉ aperis dokumenta filmo pri liaj verkaro kaj persono kun la titolo “The Icon Painting” (La ikonpentrado). Ekde 1998 li instruas en la “Rhöen-Grabfeld popola altlernejo” en Germanio kaj en la sama jaro li ekinstruis la ikonan arton en Szeged kaj Hódmezővásárhely.

Józszai ŝatas paroli pri siaj iamaj studovojaĝoj tra Bulgario, Grekio, Rumanio, Israelo, Germanio ktp, kie li intence studis antikvajn ikonojn en ortodoksaj preĝejoj. Tiel li lernis distingi taŭgan lignon por tabuloj kaj la teknikon prepari fundojn kaj fermoplatojn de bareloj. Li pentras per olefarbo, respektante la kanonon de la ikonografio. La ronda formo de la bareloj ege taŭgas por imiti la rondajn fenestrojn (“bovokulojn”) de la antikvaj preĝejoj, kiuj apenaŭ tralastas la lumon, do la piktogramoj devas estis bone videblaj eĉ el sufiĉe granda distanco, kvazaŭ ili brile “ardus”.

Kvankam li ne ŝajnas esti konata kiel medalisto, li kreis i.a. ne-ordinaran premio-medalon por la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo, donacata al meritaj esperantistoj “POR FIDELA KAJ SUKCESA LABORO”.



(vidu en jk.2 n-ro3, p.6)

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Falsado de numismatikaĵoj

Malgraŭ kreskanta nombro de sciencaj refutoj, tiel malnova kaj obstina kiel la homo (sapiens sapiens!) mem, estas liaj emoj al sintrompo kaj trompado de aliuloj. La trompado de aliaj homoj koncernas unikan homan emon: kiel maksimume havigi al si profiton, se necese aŭ prefere per falsado?

A) Monerfalsado

Dum la tuta historio registaroj atentege kontrolis la originon kaj la kvaliton de oficialaj moneroj. Kiu aŭdacis stampobati falsaĵojn de oficialaj pagiloj, povus esti punata ege severe. Tion montras i.a. surskriboj sur bankbiletoj.



Kiel falsi moneron? Se temas pri monero farita en oro aŭ arĝento, tre facila artifiko estas fandi la aŭtentikan moneron kaj aldoni kupron, plumbon aŭ alian bazan metalon. Poste oni restampobatas falsaĵojn kun la motivoj de la aŭtentika, sed en multe pli grandaj kvantoj. Pro la uzo de bazaj metaloj, la “novaĵoj” pezas malpli, kion la registaro domaĝe facile kapablas malkovri. Tamen, iu malutila blanka metalo, plateno, kun pli alta denseco ol oro, aloje fariĝas metalo kun valoro multe pli alta ol oro! Jen la vera “Eldorado” de la falsistoj!

Por etaj falsistoj ekzistas alia, pli simpla tekniko. Ili uzas bazajn metalojn kun malalta fandopunkto (ekzemple aloj surbaze de plumbo) kaj ŝablonojn faritajn el hardita argilo. La rezulto estas moneroj en arĝenteca koloro, malsama ol la koloro de la aŭtentikaj. Do ... oni simple orfarbas ilin, por ke ili povu cirkuli kiel la originalaj.

Tamen, registaroj, estante super siaj propraj leĝoj, kopiis ankaŭ plurajn monerojn de falsistoj kaj nuntempe mem uzas bazajn metalojn por la produktado de modernaj moneroj!

Aktuale la problemo pri falsado de moneroj draste ŝanĝiĝis. La friponoj nun amasproduktas per sofistika imitado de la procezoj de la oficialaj monerfarejoj. Ili tiucele uzas disketojn el latuna lameno, kiuj estas sekve stampataj per altpremaj presiloj. La kvalito de tiuj latunaĵoj ordinare sufiĉas por ĉiutaga negocado, tamen la kvalito de kelkaj falsaĵoj estas tiel alta, ke eĉ la plej trejnita okuloj ne povas distingi la falsaĵojn. Falsaj moneroj estas eĉ trovataj en oficialaj monersaketoj disponigataj de la bankoj!

Fojfoje la registaro mem neglektas la sekurecon. Fama estas la tiurilata anekdoto pri la brita sespenca monero de 1887, dum la regado de reĝino Viktoria. Jen nekredbla ekzemplo de terura stultaĵo fare de la brita reĝa monerfabriko. Oni stampobatis arĝentan moneron sespencan kaj samtempe eldonis oran duonsuverenon (duonpundon). Ambaŭ havis preskaŭ egalan fasonon kaj formaton kaj krome la indikoj de la valoroj mankis. Kompreneble kaj

evidente falsistoj tuj misuzis la okazon por or-tegi la arĝentajn monerojn, interŝanĝante ilin kun nesingarduloj kiel duonpundojn!



B) Falsado de bankbiletoj

En multaj epokoj kaj landoj okazis oficiala malnobligo de valutoj, kiam la registaro bezonis pli da rimedoj ol tiom, kiom la fisko povis laŭleĝe provizi.

Ekzemple en Britio komenciĝis la ŝanĝo dum la unua mondmilito, kiam oraj moneroj estis anstataŭigitaj per bankbiletoj. Post la dua milito ankaŭ arĝentaj moneroj estis anstataŭigitaj per moneroj faritaj el blanka kupronikela alojo sen arĝento. Kiam eĉ presi bankbiletojn de unu pundo fariĝis malĉipa, la pundo iĝis monero el latuno. La ŝtato do mem malnobligis la oficialan metalan monon, do malaperis por falsistoj la lukro per falsado. Tial ili ekde tiam koncentriĝas falsadi bankbiletojn.

C) Falsado de numismatikaj antikvaĵoj

Principe ĉiu antikvaĵo kun historia, arta aŭ rareca graveco povas esti subjekto de falsado. Tio koncernas ne nur artaĵojn kiel pentraĵojn ktp, sed ankaŭ “juvelojn” kiel antikvajn monerojn kaj medalojn. Pro manko de kompetento aŭ de profesiaj iloj la t.n. falsistoj ofte nur estas amatoraj falsantoj kaj iliaj faraĵoj tuj estas senmaskigataj. Tamen ekzistas ankaŭ tre lertaj “kolegoj”, kiuj sukcesas produkti almenaŭ perfektajn “kopiojn”. Kelkaj bonaj ekzemploj estas du iamaj kaj aktuale tre multekostaj pagiloj, unu el la eritrea kolonio de la itala reĝo Emanuelo, alia el San-Marino. Hazarde kaj samtempe antaŭ kelkaj jaroj membro de nia redakcio trovis kaj aĉetis la subajn du “arĝentajn” kopiojn okaze de bazaro en la najbareco de la urbo Veneto (Italio). Ili kostis nur po kelkajn eŭrojn kaj ili estas supraĵe tiel bonkvalitaj kaj bonaspektaj, ke neniu numismato povus rezisti la okazon, malgraŭ la certeco, ke temas pri falsaĵoj aŭ aktualaj kopioj.



Eritreo

San-Marino

Kiel rekoni falsaĵojn?

La pli malamataj malamikoj de falsistoj estas la rando kaj la pezo. Pasintece, kiam oraj kaj arĝentaj pagiloj ankoraŭ cirkulis, friponoj per metaltondiletoj fortondis fragmentojn de la ekstera parto de moneroj. Nur per pesilo oni povis do montri, ĉu iu monero jes aŭ ne perdis valoron. Sekve, moneroj ricevis i.a. noĉrandon, foje kun surskribo, do jen vera koŝmaro por trompemuloj kaj falsistoj!



Kompreneble ankaŭ multekostaj esperantaj (!) pagmedaloj kiel la famegaj spesmiloj kaj la grandaj stelo-pagmedaloj verŝajne estis aŭ estas falsataj. Kaj tio ankaŭ koncernas medalojn kiel la suba el Francio, eldonita en 1912 de la franca Esperanto-gazeto “La Movado”.



Bonvolu kompari la du surskribojn!

TERMINARO

Alfabeto Listo (19)

Blankaĵo: neuzita ĉarnira sigelilo (vidu ankaŭ: “ĉarnira sigelilo”).

Blankboligi: pritrakti per impregnaĵoj arĝentan objekton, entenantan kupron, tiel ke la kupro de la surfaco solviĝas, ĝis la objekto aspektas blanka.

Brustostelo: ordeno aŭ parto de ordeno, kiel broĉo surhavebla sur jako (de uniformo ktp).

Ĉarnira sigelilo: plumba sigelilo por sigeli varojn por tiel konfirmi la kvaliton kaj la ĝustajn mezurojn kaj enhavon de ujoj; fojefoje por indiki, ke fiskaj devoj estas plenumitaj.

Elaĉetsumo: mono donita al la ŝtato, per kiu riĉuloj kaj aliaj potenculoj rajtas elaĉeti kondamnendajn krimojn.

Judasmon(er)o:

- arĝentaj moneroj, kiujn laŭ la Biblio (N.T.) Judaso ricevis por perfidi Jesuon
- lunario (herbo kun moneraspektaj elementoj).

Kasmono: mono, trovebla en la kaso de butikisto.

Konvertebleco:

- eblo amortizi deprunton per mono, alportita de nova deprunto, aranĝita ordinare je malpli alta interezo
- eblo ŝanĝi deprunton en akciojn
- eblo transkalkuli (ekz. dolarojn en pundojn).

Monigi: transformi en monon.

Monsistemo: jura statuto, difinanta la valoron de la monunuo rilate al oro aŭ al fremdlanda mono, la reĝimon de la emisio kaj la kondiĉojn de konvertebleco.

Oriĥalko: (= montara kupro) alojo konsistanta el 80% da kupro, 20% da zinko kaj iom da plumbo. Sufiĉe rara alojo en la numismatiko. Unue aplikita de Mitridato la 6a (135-63 a.K.), poste de Julio Cezaro (45 a.K.).

Sangomono: mono gajnita per rimedoj, kiuj enhavas (korpan aŭ alian) misuzon aŭ mortigon.

Sekurdrato: metala aŭ tekstila drato. Unu el la rekoniloj de la aŭtentikeco de bankbiletoj.

Senmona: tute malriĉa.

Virenio: tavoligita monermetalo, konsistanta el nikela kerno kun rulpremita tavolo alojo el kupro, 10% da zinko kaj 9% da nikelo. La moneroj havas helflavan koloron kaj, pro la zinko, ili estas iom magnetaj.

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Esperanta numismatiko en uniformo (3)

B. Militistoj

1. Esperanto kiel “helpolingvo por la paco”



H. Sebert

Kiam Esperanto en Eŭropo dum la unua duono de la 20a jarcento paŝon post paŝo disvastiĝis, i.a. kiel t.n. helpolingvo por la paco, la utilo de internacia lingvo ne eskapis al la atento de ne nur policaj oficiroj, sed ankaŭ de pluraj armeaj altranguloj, kiel la franca generalo Hippolyte Sebert (1859-1930), dumviva amiko kaj konfidenculo de Zamenhof. Krome li estis prezidanto de la “Konstanta Komitato de la Kongresoj”.



Aliaj esperantistoj, kiel la fama René de Saussure, je la komenco de la 20a jarcento efike propagandis por Esperanto inter oficiroj de la svisa armeo.

2. Sur la militkampo

Esperanto unuafoje rolis kiel pontolingvo en 1904 dum la rusa-japana milito. La kozaka generalo Savickij laŭdire sendis esperantlingvan mesaĝon al la japana komandanto, por proponi suspendon de la bataloj, por ke la batalpereintoj povu esti enterigotaj. Post kelkaj horoj la japana altrangula oficiro estis respondinta esperantlingve.

En 1906 la franca leŭtenanto Georges Bayol (1871-1914), rekrutinstruisto en la speciala militista lernejo de St-Cyr kaj unu el la plej ardaĵoj francaj propagandistoj de la zamenhofa helpolingvo, publikigis broŝuron “Esperanto kaj Croix-Rouge”. Celo de la broŝuro estis per kelkaj esperantlingvaj frazetoj helpi soldatojn kaj vunditojn el diversaj armeoj kompreni sin reciproke.



Ankaŭ generalo Gérard Leman (1851-1920), en 1914 la famega defendinto de fortikaĵoj en Lieĝo, sentis la neceson de komuna helpolingvo. En la enkonduko de posta memorlibro “La Belgique” (Belgio), eldonita en Lieĝo en 1920, li esprimis esperantlingve sian konsternon pro la konstato, ke “...en la epoko de vaporpropulso, elektro kaj aernavigado, kiuj tiel efike estas progresigantaj la disvastigon de ideoj kaj la civilizacion inter la popoloj, samtempe estas rimarkinde, ke koncerne la internacian lingvon ekzistus certa sinretenemo. Tamen tiu lingvo estas la plej grava realigo de la historio rilate al la disvastigo de ĝenerala kono.” Li aldonis franclingve: “Neniam iu komprenos, kial la registaro ne konsideras kiel devigan devon favori la konon kaj disvastigon de tiu helpolingvo.”



Ekde 1938 en Francio en diversaj kazernoj fakultativaj Esperanto-kursoj estis organizataj.

En 1940 kaj 1941 E.D. Durrant eldonis armean kaj aviadan terminarojn, ekskluzive en Esperanto.


Peter Clissold, komandanto de la brita maristaro en 1950, aperigis maristan terminaron en pluraj lingvoj, inkluzive en Esperanto.

En la jaro 1951 en Usono la ĝenerala komandantaro kompiligis Esperanto-vortliston, uzendan fare de atakontaj armeoj dum ekzercaj militaĵoj. (*Vidu artikolon en la venonta numero!*)

La famega “Militista Vortareto” de Louis Bastien (1869-1961) estis eldonita en 1955 kun enkonduko prezentita de generalo Malraison (Francio), generalo Concaro (Italio) kaj de kolonelo Bernard de la Reĝa Militista Lernejo en Belgio. Ĝi estis verkita en kvin lingvoj: esperante, france, angle, germane kaj itale.



Jen la parolo al generalo Malraison: “*Fine ... Bonvoluloj laboris por*



starigi la unuan modernan vortareton de la militistaj terminoj en Esperanto. Kiel necesa, kiel nepra estis tia vortareto! Strategio estas arto (...) por ne multaj, altrangaj armeaj estroj. Taktiko, kontraŭe, estas scienco, ekzakta scienco. Kvankam ĝi senĉese evoluadas, kiel ĉiu scienco, ĝi sidas sur sensanĝaj, precizaj bazoj. Ĉiu vorto en operaciordono havas propran valoron, strikte difinitan sencion. Fari tradukon eraran, aŭ nur proksiman, estas krimo! Ĉar el tia procedo rezultas ofero de miloj da homaj vivoj!”

Alia interesa aspekto estas la rolo de Esperanto en la vivo de militkaptitoj, dank’ al esperantistoj, kiuj ofertis al la samsortuloj la okazon lerni la internacian lingvon kaj tiel malpliigi la konfuziĝon kaj la enuadon. Unu el la pli famaj sendube estis Julio Baghy, kiu raportis pri tiu sperto i.a. en la romano “Viktimoj” (1926).



654. Grupo de diversnaciaj militkaptitoj en Siberio. En la unua vico de starantoj (malantaŭ la sidantoj) la unua Jozefo Mihalik, la kvara Julio Baghy

3. Provizora postparolo de la redakcio

Evidente estas malkompleta la supra historia kalejdoskopo. Nia intenco estas montri la unuajn rezultojn de la unua rikolto. Restas do multe da demandoj respondendaj:

- Ĉu militistoj kaj militkaptitoj ricevis insignon/diplomon je la fino de esperanta kurso? Eble jes, ĉar ĝin ricevis komence de la sama jarcento policistoj dum aŭ post universalaj kongresoj, i.a. en Germanio (Hamburgo, Kolonjo), Nederlando (Hago), kaj Belgio (Antverpeno).

- Ĉu ekzistas esperanto-medaloj memore al militistaj eventoj, jubileoj aŭ esperanto-kursoj ktp?

La “juna” ENA jam trovis numismatikaĵojn, kiuj atestas pri ligoj inter militistoj kaj Esperanto. Aliaj atestoj, kiel libroj, leteroj, bildkartoj, fotoj ktp klare montras, ke la “sabroklakigistoj” kaj la esperantistoj sufiĉe longtempe havis komunan celon kaj komunan vojon. Almenaŭ ĝis la anglalingvaj potenculoj ostaĝigis la “oldan mondon” kaj dise forpuŝis la internacian lingvon...

Ĉiel, ni daŭrigos la serĉadon kaj esperas, ke hazarde iam venos al ni el la historiaj nebuloj agrablaj surprizaĵoj dank’al l’atento de esperantistoj, numismatoj aŭ...militistoj!

Fonto de la fotoj 652, 653 kaj 654 estas la “Enciklopedio de Esperanto”, dua volumo

Militkaptitoj malkovris la internacian lingvon



652. Partoprenantoj de Esperanto kurso en la internigejo de Zeist



653. Grupo de militkaptitoj esperantistaj en franca tendaro



Francaj militkaptitoj-esperantistoj troviĝis ekde 1915 en Chemnitz [ĥemnic], Germanio, en la militkaptitejo Ebersdorf.

Kun danko al d-ro Stephan Pfalzer, sekciestro en Chemnitz

NUMISMATIKA FORUMO

Ĉu oni reviziu la spesmilon?

Terry Watts

La spesmilo reviziata (4)

En antaŭaj artikoloj pri la spesmilo mi donis la difinon en or-pezo, rimarkigis, kiel la spesmilo ne tiom perdis sian valoron, kiom faris multaj valutoj, kaj esploris la principojn, laŭ kiuj oni povus nun revivigi ĝin.

Sed oni ne povas plene trakti nian temon de la eventuala renaskiĝo de la spesmilo, sen diri kelkajn vortoj pri aliaj ‘internaciaj’ monoj.

Nuntempe furoras la ideo de kriptomono, de kiuj ekzistas pli ol 200 specoj – eĉ unu alprenis vorton el Esperanto kaj nomas sin ‘Monero’. Sed verŝajne la plej konata de la publiko estas ‘Bitcoin’.

Mi kredas, ke tiaspeca mono tute ne taŭgas por la esperantistoj. La mania spekulado estas jam fi-fama. Rigardu nur, per la Reto, grafikaĵon de la kurzo inter la dolaro kaj Bitcoin dum la lastaj kelkaj jaroj! Mono kies valoro povas salti supren kaj suben, plonĝi tiel rapide ne estas stabila mono.

Cetere, kiu kompensus vin, se via havaĵo en tia mono estus pirate ŝtelita per malica komputa spertulo. Vi nur bezonas serĉi en la Reto, por trovi liston de ŝtelegoj sur la kripto-mona kampo.

Tamen la stelo, laŭ la unua rigardo, estas alia afero. Ĝi jam delonge alprenis konkretan formon kaj bilete kaj monere en diversaj nominalaj valoroj, kaj farita el diversaj materialoj, plejlaste el plasto kaj eĉ el tre fajna arĝento – foje la eldonkvantoj surprizas.

Plue, oni lastatempe testis la uzeblecon de la plastaj stelo-moneroj por malgrandaj aĉetoj en pluraj Esperanto-kongresoj.

Do kio estas la problemoj? Kial tiu ne plene taŭgas kiel esperantista mono, kaj kial voli revivigi la spesmilon?

La ĉefa afero esta la difino de la valoro de la stelo. Por detala historio iru al la rubriko ‘Eksteraj Ligiloj’ en la vikipedia artikolo pri la stelo (monunuo), kaj klaku sur [La Stelo: Morto de ekonomia iniaciato](#) (tiel).*

Tamen, resume, mi povas diri, ke je naskiĝo ĝi ligiĝis al la prezo de ordinara pano en Nederlando (tiel 1 stelo egalas kvaronon de nederlanda guldeno), poste la stelo estis revalorigita (duobligo), kaj pli malfrue oni klopodis eĉ fari ĝin inflaci-imuna per formulo, sed spertante multajn malfacilaĵojn en tiu tasko.

La tre aprobinda revo fari konstant-valoran monon klare ne realiĝis. La nuna publikigita kurzo estas proks. 1 stelo = 0,25 eŭrojn,** – origine 1 stelo = 0,25 guldenojn. Sed la nuna eŭro tute ne egalas la tiaman guldenon en aĉetpovo.

Efektive la valoro de la stelo ŝajnas iom arbitre determinata, kaj, per la formulo por ĝia estonta revalorigo, ne tiel facile kontrolebla far la ordinara esperantisto. Tute kontraste kun la spesmilo, kies ekvivalento en la valuto de kiu ajn lando estas tre facile kalkulebla – oni nur bezonis scii la prezon de 0,8 gramoj da oro en la koncerna valuto.

La dua afero estas la re-aĉetoj de la stelo (reŝanĝo en konvencian monon) kaj la interŝanĝo inter la diversaj konkretaj realigoj de la stelo.

Ideale, se vi havas, ekzemple, dudek 5-stelajn monerojn (aŭ biletojn), vi povu ŝanĝi tiun sumon al 100-stela monero (aŭ bileto) same kiel oni senĝene interŝanĝas en via propra lando divers-valorajn monerojn en ekvivalentan bankbileton.

Sed estas plena ne-kohereco inter la nunaj vendoprezoj por la diversaj stelo-moneroj. Efektive, la diversaj realigoj de la stelo (escepte eble de la plastaĵoj) ŝajnas, je la nuna momento, pli aferoj por kolektantoj ol serioza internacia mono.

Oni povus simple konservi la nunan konjunkturon, lasante ke la valoro de specifa realigo de la stelo estu por-okaze kaj laŭ-vendiste determinata.

Aliflanke, se oni fiksus kurzon (almenaŭ teorie) inter la stelo kaj la spesmilo, tio iasence validigus la nunan stokon de steloj, fiksus la valoron de la stelo ne nur hodiaŭ sed ankaŭ estonte, kaj integrus la stelon en la revivigon de la spesmilo.

Sed kiu estu tiu kurzo? Post iom da cerbumado, mi konkludis, ke taŭga kurzo estus 1 stelo = 1 spesdeko (100 steloj = 1 spesmilo). Tiel 1 stelo egalus ĉ. 0,25 eŭrojn (en la momento de skribo).***

Restas, por fini ĉi tiun superrigardon, diri kelkajn vortojn pri kial oro estas la sola akceptinda bazo por ia internacia mono, kiel ĝi estis antaŭe akceptata en multaj landoj dum longaj periodoj. Kaj tio estos unu el la temoj en posta artikolo en la serio.

*Mi ne povas ne menciigi ĉi tie kiel fonton de fascinaj detaloj pri la elstampaĵo de esperantaj medaloj kaj moneroj, la tre bele prezentitan ret-gazeton 'Esperanta Numismatiko', kiun vi trovos i.a. serĉante la Bitotekon de la HEF.

**Kiam la eŭro anstataŭis la guldenon, 1 guldeno egalas 0,45 eŭrojn. Tiel oni povis kalkuli la originalan stelon je 11 eŭro-cendoj nuntempe, aŭ agnoskante la duoblan revalorigon, je 0,22 cendoj.

*** (Hodiaŭa orprezo en eŭroj por 1 unco)/Orprezo de 1 unco en spesmiloj 100).

Notu: La orprezo en spesmiloj por 1 unco da oro estas ĉiam la sama (ĉ. 42 Sm). Ĝi estas nur rilato de pezaj kaj ne varias. La egalvaloro de spesmilo en aliaj valutoj ja ŝanĝiĝas kun la prezo de oro en tiuj valutoj.

Daŭrigota

EL LA GAZETARO

La financa puĉo de Zuckerberg: LIBRA!

Fejsbuko de Mark Zuckerberg (privata kapitalo: 70.200.000.000 USD!) fine prezentis sian diĝitan monunuon. Per cifereca “monujo” vi povus facile elspezi, endosi kaj ŝpari monon...

Kio estas *libra*?

Per la nova valuto *libra* eblus interŝanĝi *libra*-jn kontraŭ dolaroj, eŭroj aŭ iu ajn alia valuto. Kiom unu *librakonkrete* valorus, ankoraŭ ne estas diskonigita, sed Fejsbuko celas valoron egalan al dolaro, eŭro aŭ funto. Laŭdire...

Viajn *libra*-jn vi serĉu en la t.n. *wallet* (= monujo), t.e. ap(likad)o, en kiu troviĝus via saldo kaj en *libra*- kaj en eŭro-valoroj. La nomo de tiu saldujo estus *Calibra*.

Kion celas Fejsbuko?

Ni ne silentu pri la plej granda avantaĝo de Fejsbuko: monate 2 700 000 000 personoj uzas ĝin, por preskaŭ senkoste dissendi mesaĝojn tutmonden. Fejsbuko tial celas ripeti tiun gigantan sukceson en la kampo de financoj. Krome, aktuale estas ankoraŭ 1 700 000 000 mondĉivitanoj sen enirebleco por tradiciaj bankoj. Do... Kaj, la Monda Banko kalkulis, ke migrantoj fine de 2019 estos endosintaj 490 000 000 000 eŭrojn al t.n. evoluantaj hejmlandoj! Tamen... transpagaj entreprenoj kiel Western Union kaj Moneygram “senkremigas” 7 ĝis 9,3% por t.n. transpagaj kostoj. Per la fejsbuka *libra* tiuj kostoj estus preskaŭ nul.

Ĉu Fejsbuko denove rolus sola?

Tre, tre verŝajne la tradiciaj bankoj kaj la transpagaj entreprenoj ekde venonta jaro senĉese travivados financajn koŝmarojn. Aliflanke jam 28 diversspecaj entreprenoj reagis pozitive koncerne kunlaboron kun Fejsbuko, i.a. Visa, Mastercard, Paypal, Spotify, Uber, Ebay k.a. Kiu ja, krom Zuckerberg, povus nuntempe fondi tian mondvastan asocion? Do, tiuj entreprenoj kompreneble ne volas fordormi la okazon!

Kiel vi mem kaj miliardoj da aliuloj probable agos ekde 2020?

Ĉiel, la potenco de la nova valuto estas giganta. Malavantaĝo, kompare al bitmono, estas, ke Fejsbuko preskribos, kiel oni uzu la diĝitan monon, almenaŭ tio estas la opinio de la financa eksperto Jean-Luc Verhelst.

Kelkaj gravaj aliaj demandoj restas: kiel Fejsbuko organizus sistemon, kiu funkciigu rapide, sekure kaj fidinde; ĉu la publiko senhezite enmanigos sian monon al Zuckerberg kaj helpantaro? La aventuristo emfazas, ke ne nur Fejsbuko decidus, sed ĉiu entrepreno, kiu akceptas pagi 9 000 000 eŭrojn, por aliĝi al la “Granda Asocio”. Krome ĝi promesas ne kunligi financajn informojn kun personaj informoj. Ĉu fidinda promeso aŭ ne?

Ĉiel, eble Fejsbuko vere kaŭzos revolucion kaj rompos la hegemonion de la bankaro...

Fontoj: La belga gazeto: “De Morgen” de la 19a de junio 2019, p.3
Jean-Luc Verhelst: “Bitcoin, the Blockchain and Beyond” 2017

RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

08.07.2019 10:46

Kara Jozefo!

Malgraŭ la feria etoso kaj la someraj temperaturoj mi denove devas frapi sur vian pardonon por peti vian helpon por provlegado.

Multan antaŭdankon kaj ĉion bonan por vi kaj via familio!

Amike kaj numismate,

Bert

12.07.2019 20:29

Kara Bert,

jen resende via/nia kara revuo kun miaj sugestoj por plibonigo.

Estante inter du kulturaj vojaĝoj, mi deziras al vi agrablan somerumadon kaj malpli da varmego!

Amike: Jozefo



19.07.2019 19:22

Bert,

En la enkonduka teksto de la nova ENA-revuo vi lanĉas la ideon de numismatika terminaro.

Jam ekzistas Vikipedio-paĝo (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Numismatiko>) kun tre baza terminaro (17 eroj), kaj 4 detalaj artikoloj. Ĉu ne eblas pliampleksigi tiun paĝon transprenante informojn el jam aperintaj numeroj de la revuo? Certe inter la legantoj de la bulteno estas personoj kun baza kono de vikipedio kaj numismatiko kaj iom da libera tempo kiuj kapablas almenaŭ parte realigi tion.

Mi atentigas pri erara ligo je la fino de la artikolo,

https://eo.wikipedia.org/wiki/Numismatiko#Eksteraj_ligiloj. La unua ligo kondukas al paĝo de esperanta asocio kie unuavide nenio videblas pri ENA. Ĉu, atendante propran artikolon aŭ

retpaĝon de ENA, pripenseblas (interkonsente kun Bitoteko) fari korektan ligojn al Bitoteko, tiel ke oni tuj alvenas ĉe la kolekto de ENA-revuoj? La ligo povus estis la serĉ-instrukcio kiun mi ĵus uzis

(http://bitoteko.esperanto.es:8080/jspui/handle/11013/7/browse?type=title&sort_by=1&order=ASC&rpp=20&etal=-1&starts_with=ENA) sed eble estas pli bona solvo

Roland

28.08.2019 23:18

Multan dankon, Roland kaj pro la atentigo kaj pro la informo pri la terminaro. Mi pripensas kiel agi plej efike.

Kroman demandon: ĉu la fonduso posedas iun malnovan revuon "La Kolektanto"? Se jes mi intencas denove viziti la bibliotekon en Kortrejkio por spuri artikolojn pri numismatiko.

Amike kaj numismate,

Bert

29.08.2019 7:31

Bert,

Certe estas ekzempleroj de La Kolektanto, sed kiel vi scias la kolekto de la Fondaĵo Vanbiervliet nun estas disdividata kaj parto estas ankoraŭ en Kortrijk, parto ĉe Marc, parto jam rezervita por aliaj bibliotekoj. Necesas rigardi surloke.

De la duoblaj numeroj kiuj ankoraŭ estas en Kortrijk

(<https://sites.google.com/site/esperantokortrijk/duoblaj-revuoj>) jenaj revuoj estas tuj haveblaj:

Amikeco 7/8 1925 (Internacia Kolektanto-Klubo)

Kolektado 1, 2, 5 1980), 8 (1981)

Kolektanto (Bulgario) 1978-1, 1982-4, 1985-3

Roland

05.09.2019 19:39

Bert,

En Kortrijk estas diversaj serioj (verŝajne nekompletaj, foje kun duoblaj numeroj):

- Kolektado 1978-1981

- La Kolektanto 1974, 1977-78, 1979 3 k 4, 1985 1

- La kolekto internacia 1/61

Roland

06.09.2019 18:58

Saluton Roland!

Dankon pro la invito. Mi intencas viziti la bibliotekon la 24an de septembro, kaj revidi vin tie. De kiu horo oni rajtas eniri?

Amike kaj numismate,

Bert



19.07.2019 7:41

Estimata Bert Boon!

Grandan dankon pro sendo de la ENA - revuoj kaj aligo al la asocio.

Mi estas 50 jara kolektanto el la bela olda ukrainia urbo Lviv. Mi havas 33 jaran esperantistan sperton, kaj samlonge mi kolektas monerojn.

Amike,

Serhij

19.07.2019 10:53

Dankon pro via reago!

Bert



20.07.2019 3:08

Kara Bert!

Dankegon al Vi pro la belega, nova numero de la ENA-revuo!

Plej amike,

Ludoviko Molnár kaj Julinjo Farkas
Budapeŝto, Hungario



20.07.2019 3:36

Estimata Bert Boon!

Vi faras gravegan laboron por propagando kaj disvastigo de la Esperanto - afero!

Dankon.

Se mi rajtas ricevi provnumeron, mi nepre montros tiun interesan ĵurnalon "Esperanta Numismatiko" al odesaj numismatoj.

Mi ankaŭ havas demandon.

Hodiaŭ estas precize 21 jarojn, kiam en Odeso okazis la 71-a SAT-Kongreso.

Ĉu Vi interesas pri koverto, dediĉita al tiu dato?

Amike,

Tamara Popova

Mi konsentas aliĝi.

27.07.2019 10:25

Saluton kara samideanino!

Multan dankon pro via membriĝo. Mi ĝojas bonvenigi vin kiel 129an membron de ENA.

Ni kunsendas la lastan numeron. Vi rajtas kaj povas, se vi volas, ankaŭ elŝuti la jam aperintajn jarkolektojn. La novaj numeroj, kiujn vi aŭtomate ricevos, aperos je la fino de januaro, aprilo, julio kaj oktobro. Se vi havus problemon elŝuti la antaŭajn numerojn, bonvolu kontakti min.

Saluton Tamara!

Dankon pro via afabla reago koncerne nian laboron. Mi ne povas sendi numeron de la revuo al via poŝtadreso, ĉar la revuo nur ekzistas rete. Tial ĝi estas senkosta.

Min certe interesas la koverto dediĉita al la datreveno de la 71-a SAT-kongreso. Mi antaŭdankas vin.

Amike kaj numismate,

Mag. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

21.08.2019 18:52

Estimata samideano Bert Boon!

Tatjana MIĤNO transdonis al mi vian peton pri argila medalo de Ukrainio, pri kiu vi malhavas fotojn kaj aliajn teknikajn informojn por priskribi ĝin en via revuo.

Mi povas helpi ENA-n pri tio.

Mi konas la aŭtoronkaj la historion de kreadode tiu argila medalo.

Skribu, kio vin interesas, krom foto?

Krome, vi ne respondis pri koverto, dediĉita al 71 SAT-Kongreso, kaj mi ne ricevis paperan ekzempleron de via revuo.

Amike,

Tamara Popova

24.08.2019 20:09

Tre estimata samideanino Tamara!

Unuavice mi volas sincere peti pardonon pro la prokrasto de mia respondo. Mi pensis, ke mi jam respondis, sed mi do eraris.

Mi tre ŝatus ricevi la koverton pri la 17a SAT-kongreso kaj kiel pagi por ĝi.

*Ĉu mi jam diris al vi, ke la aliĝo kaj la revuo de ENA estas **tute senpagaj**? Tial ni **NE sendas surpaperan revuon** (kun multaj sendokostoj), sed perretan. Tamen eblas kopii la revuojn hejme kaj elŝuti la tekstojn kun fotoj.*

Por priskribi kaj montri la argilan medalon, mi petas bonkvalitan foton kaj bezonas jenajn informojn: diametron aŭ mezurojn/ pezon en gramoj / eldonkvanton / substancon aŭ metalojn / eldonjaron / nomon kaj koncizan biografion, se eble ankaŭ foteton de la aŭtoro. Ege interesa estus ankaŭ la historio de la kreado!

Kroma peto: ĉu eblus mendi unu ekzempleron de la medalo por mia kolekto? Kiel mi pagu?

Mia hejmadreso: BERT BOON, MERELHOF 8, B-3300 TIENEN, BELGIO

Mi anticipu kaj kore dankas!

Amike kaj numismate,

Bert

ALDONE: lasta numero de nia revuo

09.09.2019 18:09

Estimata samideano Bert!

Mi ankoraŭ ne havis eblecon viziti odesan Muzeon de Numismatiko por konsulto.

Sed mi trovis alian metalan aĵon pri 74 SAT- kongreso.

Ĉu Vi interesiĝas pri ĝi?

Amike,

Tamara Popova

17.09.2019 23:06

Saluton Tamara!

Dankon pro la fotoj. Tiu medalo jam estas en mia kolekto. Espereble vi trovos tempon por viziti la Muzeon kaj mi jam dankas vin tutkore!

Amike kaj numismate,

Bert



25.07.2019 16:07

Bonan tagon, Bert!

Unue. “Mi konsentas aliĝi”

Due. Mi estas tre juna esperantistino (2 jaroj) kaj eklernis Esperanton memstare. Mi loĝas en vilaĝo, sed mi trovis kelkajn esperantistojn en Odeso kaj konversacias kun ili fojfoje.

Mi komencas fari dulingvan (esperanta + rusa) retpaĝaron “Verda Lampo” - <http://verdalampo.info> (ekde septembro 2019 – <https://verdalampo.info>). Tie ekzistas la rubriko “Numismatiko” - <http://verdalampo.info/muzeo/monoeo.html> sed ĝi nun estas malplena.

Ĉu povas mi peti vin por skribi la artikolon pri esperanta numismatiko?

Estime,

Tatiana Mihno

27.07.2019 10:13

Saluton kara samideanino!

Multan dankon pro via membriĝo. Mi ĝojas bonvenigi vin kiel 130an membron de ENA.

Ni kunsendas la lastan numeron. Vi rajtas kaj povas, se vi volas, ankaŭ elŝuti la jam aperintajn jarkolektojn. La novaj numeroj, kiujn vi aŭtomate ricevos, aperos je la fino de januaro, aprilo, julio kaj oktobro. Se vi havus problemon elŝuti la antaŭajn numerojn, bonvolu kontakti min.

Saluton Tatiana,

Mi gratulas vin, junan esperantistinon, pro via iniciativo eldoni la retpaĝaron “Verda Lampo” kaj volonte helpos vin per tekstoj por via rubriko pri numismatiko. Vizitonte niajn malnovajn revuojn vi trovos nultajn tekstojn sen kaj kun bildoj. Se vi mencios al mi kion vi volas por via rubriko “numismatiko”, mi sendos tiujn artikolojn en WORD. Mi nur petas ĉiam mencii la ENA-revuon (jarkolekton / numeron / paĝon).

Kiel unua teksto por la rubriko mi aldone sendas al vi la varbilon de ENA.

Amike kaj numismate,

Mag. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

31.07.2019 7:43

Bonan tagon, Bert!

Dankon! Baldaŭ mi verkos la artikolon kaj sendos ĝin al Vi por kritiki .

Estime,

Tatiana Mihno

08.08.2019 8:53

Bonan tagon, Bert!

Mi legas la revuojn kaj admiras ilin. Mi vidas, ke la revuo “Esperanta Numismatiko” evoluas kaj pliboniĝas.

Kiel ni traktis, mi prenis unu artikolon el la revuo por mia dulingva retpaĝaro kaj enretigis ĝin tie ĉi (eo) - <https://verdalambo.info/muzeo/monoeo.html> kaj tradukis ĝin al la rusa lingvo - <https://verdalambo.info/muzeo/mono.html>

En antaŭparolo (eo kaj rusa) mi rakontas pri ENA, la revuo, kaj kiel aboni.

Verŝajne, vi ekridos, kiam vi ekscios, ke mi decidis kolekti Esperantan moneron kaj jam ekpagis unuan ekzempleron – ĵetonon pri Eroŝenko, sed, kiel mi komprenas, ĝi ne estas arĝenta, ĉar ĝi estas malmultekosta – preskaŭ 3 eŭron. Nun atendas ĝin.

Estime,

Tatiana

11.08.2019 14:04

Saluton Tatiana!

Unue multan dankon pro viaj afablaj komentoj koncerne la ENA-revuon.

Mi gratulas pro via iniciativo traduki la ENA-artikolojn ankaŭ en la rusan. Bona ideo!

Mi tute ne ekridis pri via decido ekkolekti esperantajn numismatikaĵojn, tute male! La Eroŝenko-medalo estas bona komenco de kolekto, sendube. Ne gravas, ke ĝi ne estas en arĝento, ĉar ĝi estas bela.

Ĉu vi intencas sendi al mi vian revuon? Antaŭdankon!

Mi havas peton. Aldone mi sendas kopion pri argila medalo de Ukrainio pri kiu al mi mankas foto kaj aliaj teknikaj informoj por priskribi ĝin en nia revuo. Kiu el viaj gesamideanoj povus helpi ENA-n?

Varmajn salutojn el Belgio de

Bert



13.08.2019 7:25

Bonan tagon, Bert!

Mi estas konatulino de Tamara Popova, kiu havas tiun argilan medalon. Kiam mi gastis en ŝia domo, mi hazarde ekfotis ĝin. La fotojn mi sendas al vi.

Bedaŭrinde, la edzo de Tamara nun estas observata de medicinistoj (apopleksia atako), kaj ŝi estas apude kun li.

Poste mi faros fotojn de bona kvalito, mezuros parametrojn kaj ekscios la historion de ĝi. Aŭ Tamara skribos al vi mem.

Kiam? Ne scias... Esperas ke tio estos baldaŭ, ĉar je septembro mi vojaĝos tra Krimeo al Norda Kaŭkazio. Mi revenos nur post la 20a de septembro.

Estime,

Tatiana

15.08.2019 12:43

Kara Tatiana!

Mi kore dankas vin pro la sendo de fotoj de la argila medalo. Nun mi scias kiel ĝi aspektas! Bonŝanca hazardo, ke vi fotis ĝin ĉe s-ino Popova. Mi supozas, ke mia artikolo estos ankaŭ interesa por la legantaro de "Verda Lampo".

Kompreneble la sano de ŝia edzo estas ege grava. Mi do paciencie atendas por ricevi pli bonkvalitan foton kaj la parametrojn kaj la historion. Bonvolu transsendi al Tamara miajn bondezirojn por baldaŭa resaniĝo de ŝia edzo.

Krome: *mi apenaŭ havas esperon ke la odesa medalo estus ankoraŭ mendebla por mia propra kolekto, sed...se jes mi dezirus aĉeti ĝin!*

Amike kaj numismate,

Bert



29.07.2019 18:02

Jen denove via turmentema amikino!

Post la antaŭa respondo mi metis en la arkivon de ENA-Revuoj la lastan de vi senditan, kaj profitis por kontroli, ĉu mi posedas ĉiujn, kaj ... ho ve! mi rimarkis ke kelkaj mankas. Kiam vi havos tempon, bonvolu sendi ilin al mi.

Jen la listo:

2015 Esperanto-Numismatika Asocio 2015 N3
2016 Esperanto-Numismatika Asocio 2015 N2
2017 Esperanto-Numismatika Asocio 2015 N1
Poste mia kolekto pri ENA-revuo estos kompleta.

Koran dankon kaj bonan somerumadon kun viaj karaj genepoj
Amike Elda

09.09.2019 20:02

Saluton!

Mi distriĝas iomete rigardante kio aperas en aŭkcio ebay: kion vi pensas pri tio ĉi?
Kore, Elda



<https://www.ebay.com/itm/CABINDA-2pcs-lot-5x500-000-000-Reis-2-500-000-000-Reis-2018-Zamenhof-Esperanto/312762337319?hash=item48d2168827:g:fikAAOSwsPhddk6v>

PS: mi trovis alian oferton, 10 dolaroj plus 4 por elsendo. Mi timas ke tio estu trompaĵo!

https://www.ebay.com/itm/CABINDA-2pcs-500-000-000-Reis-2-500-000-000-Reis-2018-Zamenhof-Esperanto/312762336622?_trkparms=aid%3D111001%26algo%3DREC.SEED%26ao%3D1%26asc%3D20160727114228%26meid%3D81adf751205742ef8c0f8a4a59c95e66%26pid%3D100290%26rk%3D1%26rkt%3D4%26sd%3D312762336622%26itm%3D312762336622%26pmt%3D0%26noa%3D1%26pg%3D2060778&_trksid=p2060778.c100290.m3507

☆☆☆☆☆☆☆☆

31.07.2019 7:16

Kara Bert, saluton!

Mi pensas ke vi nun estas libera por viziti mian retpaĝon! Vian foton mi jam havas, mi klakis kiel vi indikis en guglo kaj trovis informojn pri vi kaj pri aliaj belgaj samideanoj. Mi ĵus legis mesaĝon skribitan de vi mem pri NUMISMATIKO, diskonigitan de Germain Pirlot. Mi atentoplene ellegis ĝin kaj decidis esti membro de via asocio ENA.

Amike,

Joel

02.08.2019 10:24

Saluton kara samideano!

Multan dankon pro via membriĝo. Mi ĝojas bonvenigi vin kiel 132an membron de ENA. Ni kunsendas la lastan numeron. Vi rajtas kaj povas, se vi volas, ankaŭ elŝuti la jam aperintajn jarkolektojn. La novaj numeroj, kiujn vi aŭtomate ricevos, aperos je la fino de januaro, aprilo, julio kaj oktobro. Se vi havus problemon elŝuti la antaŭajn numerojn, bonvolu kontakti min.

Kara Joel,

Mi tre ĝojas pri via membriĝo. Mi dume vizitis vian retejon kaj admiras la organizon de tiu ejo. Mi proponas al vi publikigi en ĝi la informilon de ENA, kiun mi aldone nun sendas.

Ĝis baldaŭa reskribo!

Amike kaj numismate,

Mag. Bert Boon



01.07.2019 12:46

<https://www.ma-shops.de/hossfeld/item.php?id=190722004>

Kara Bert!

Ĉu vi konas tiun medalon?

Salutas Walter



31.07.2019 20:06

Kara Walter!

Multan dankon! Mi ne konis ĝin, sed bone la personon Rikardo Schulz. Mi do senhezite... tuj aĉetis ĝin kontraŭ 76 eŭrojn, ne ĉipe, sed gajnaĵo por mia kolekto.

Ĉu dume progresas la kreado de via Isbrücker- pagmedalo?

Amike kaj numismatege,

Bert

31.07.2019 20:34

Kara Bert!

Dankon pro via letero. Hieraŭ mi venis hejmen el Finnlando.

En oktobro mi diskutos kun s-ro mag. Andexlinger de Münze Österreich pri la medala portreto de Julia. Ni vidos, ĉu eblos kontentiga rezulto.

Salutas Walter

[https://forum.duolingo.com/comment/33436257\\$from_email%3Dcomment&comment_id%3D33442461](https://forum.duolingo.com/comment/33436257$from_email%3Dcomment&comment_id%3D33442461)

<https://www.languagesandnumbers.com/articles/en/monero-crypto-esperanto/>

Walter



02.08.2019 23:37

Kara amiko Renato!

Mi intencas priskribi la medalon de toleremo en "Esperanta numismatiko", sed mi nek havas fotojn, nek aliajn informojn . Tial mi volas peti helpon al Roman Dobrzyński, sed mankas al mi lia retadreso Ĉu vi povus havigi ĝin al mi?

Kun antaŭdanko

Amike kaj numismate,

Mag. Bert Boon

03.08.2019 8:32

Tre estimata sinjoro Dobrzyński!

Vian retadreson mi ricevis de nia ENA-membro Renato Corsetti.

Mia intenco kiel finredaktoro estas priskribi la Medalon de Toleremo, sed mankas al mi bildoj de ambaŭ flankoj kaj necesaj informoj, kiel diametro, eldonkvanto, pezo, metal-alojo, diko, gravuristo-medalisto.

Tial mi petas vian helpon.

La celo estas unue publikigi plejeble kompletan priskribon, poste per ĝi kompletigi la eldonotan unuan Katalogon de Esperanta Numismatiko.

Esperante, ke mia peto ne tro ĝenas vin, mi anticipe dankas vin kore.

Samideane kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

Aldone: la nova numero de la sesa jarkolekto



16.08.2019 20:06

Saluton Marc!

La suban afiŝon ni hazarde trovis en la Reto. Ĉu la menciita medalo por la partoprenintoj enhavas esperantajn elementojn? Mi tute ne konas ĝin.

Mi anticipu dankas vin.

Amike

Bert

19.08.2019 21:19

Saluton Bert,

Kompreneble tiun "medalon" mi rekonas. Ni fabrikigis ĝin de la firmao "Arteel" en Leuven (tiam en Margarethaplein, nun Brusselsesteenweg).

Fakte estas grandkvante fabrikita medalo, da kiu ni aĉetis areton, sur kiu ni gravurigis dorsflanke la nomon de la asocio kaj la daton.

Mi traserĉis la dosieron de Esperanto 3000, sed ne trovis plu la fakturon nek informon pri la eldonkvanto. Verŝajne estis nur ĉirkaŭ 25 ekzempleroj.

Mi retrovis unu ekzempleron, iam mi transdonos ĝin al vi :-). Ĉi-kune jam la duflanka foto. Ankaŭ mi aldonas informfolieton pri la serĉpromeno, kiu tiutempe ankaŭ aperis en nia loka revueto.

Medalo mem: 40x30 mm, totala alteco (medalo + tenilo): 120 mm, pezo 29 gr.

Cetere, se iam vi estos en la ĉirkaŭaĵo de Loveno (eblas krei tian okazon, eble kune al restoracio ĉi tie?), mi transdonos ankaŭ aliajn esperantaĵojn, kiuj pli "utilos" al vi ol al mi...

Amike,

Marc



19.08.2019 20:43

Kara samidean(in)o!

Vane nia redakcio provis trovi informojn por montri kaj priskribi en la revuo "Esperanta Numismatiko" la famegan Medalon de Toleremo, kiu sendube ankaŭ meritas lokon en la baldaŭ eldonota unua "Katalogo de Esperanta Numismatiko".

Ni esperas, ke iu en la Fondumo Zamenhof povus havigi al ni la necesajn parametrojn. Por montri al vi kiel ni priskribas medalojn en la rubriko "Moneroj kaj medaloj" ni aldonas la pli aktualan numeron.

Danke kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon

29.08.2019 14:38

Saluton!

Dankon pro via informoj. Mi skribas pri Tolerema Medalo kaj mi estos preta rapide sendi ilin.

Mi kore salutas vin!

Stanisław Dobrowolski
Fondumo Zamenhof

29.08.2019 18:56

Saluton kara samideano!

*Multan dankon pro via intenco helpi la redakcion de la revuo "Esperanta Numismatiko".
Kun intereso kaj scivoleme ni atendas. Ni sendos al via adreso la novan numeron.*

Amike kaj numismate,

*Bert Boon
Por ENA*

02.09.2019 12:19

Saluton!

Dankon por la revuo "Esperanta Numismatiko". Mi sendas al vi informojn pri la Tolerema Medalo kaj foton.

Kore salutas

Stanisław Dobrowolski

02.09.2019 22:08

Saluton Sinjoro Dobrowolski!

Multan dankon pro via helpo. Tre belaj fotoj kaj jen la informoj kiujn ni bezonas! Evidente ni sendos al vi ankaŭ la numeron kun la artikolo.,

Samideane kaj numismate,

Bert Boon



27.09.2019 9:40

Estimata samidean(in)o!

Ni intencas montri kaj priskribi en nia revuo la medalon pri R. Schultz plejeble complete, celante aldoni ĝin al la unua Katalogo de Esperantaj Numismatikaĵoj, kiu baldaŭ aperos. Ni do petas kelkajn ankoraŭ mankantajn informojn, kiel:

Eldonjaro

Evento aŭ okazo de eldono

Eldonkvanto

Alojo

Nomo de la gravuristo-medalisto

Konciza biografio de la gravuristo

Signifo de la simboloj sur la dorsa flanko

Aliaj interesaj informoj pri la medalo

Ni esperas, ke vi povos kaj volos helpi nin aŭ indiki personon kun retadreso kiu povus havigi al ni la necesajn informojn.



Altestime kaj kun anticipa danko ni salutas vin

amike kaj numismate,

Mag. Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

27.09.2019 9:56

Kara sinjoro Boon,

bedaŭrinde la eldono de tiu medalo

<https://img.ma-shops.de/hossfeld/pic/190722004bz.jpg>

okazis longe antaŭ mia tempo en la asocio Esperanto-Centro (nuna nomo: EsperantoLand).

Mi mem bedaŭrinde ne havas ideon kie serĉi la informojn kaj mi ankaŭ ne scias, kiu povus tion scii. Mi tendence dirus, ke maljunuloj de eble 80 jaroj povus havi ideon aŭ scii, kiu povus pluhelpi.

Mi sendas kopie al Utho Maier, prizorganto de la biblioteko en Aalen, kaj Johano Pachter, okupiĝanta pri Esperanto-arkivaĵoj.

Amike

Lu Wunsch-Rolshoven

EsperantoLand

27.09.2019 11:26

Kara Bert,

Lu plusendis vian leteron, al kiu mi tuj reagis:

Pri tiu medalo oni preskaŭ nenion plu scias.

Mi memoras pri ĝi, sed tiaĵo ja ne estas libro aŭ io simila. Do necesos serĉi surloke en la biblioteko, ĉu estas ie indikoj, de kie aŭ kiu ĝi venas.

Mi raportos, se mi scios ion.

Apude, mi trovis interesan informon, ke en la reto troveblas bildo, ĉar antaŭ kelkaj semajnoj oni vendis ĝin:

<https://www.ebay.de/itm/264390731160>

<https://picclick.de/Rikardo-Sulco-Grosse-Bronzemedaille-Avers-Signiirt-264390731160.html>

krom tiuj jenaj bildoj, nenio plu estas trovebla:

https://www.picclickimg.com/d/1400/pict/264390731160_/Rikardo-Sulco-Grosse-Bronzemedaille-Avers-Signiirt.jpg

[https://www.picclickimg.com/00/s/MTYwMFgxMjAw/z/8UsAAOSwo4VdIfjk/\\$/Rikardo-Sulco-Grosse-Bronzemedaille-Avers-Signiirt-1.jpg](https://www.picclickimg.com/00/s/MTYwMFgxMjAw/z/8UsAAOSwo4VdIfjk/$/Rikardo-Sulco-Grosse-Bronzemedaille-Avers-Signiirt-1.jpg)

pli grande:

https://www.picclickimg.com/d/w1600/pict/264390731160_/Rikardo-Sulco-Grosse-Bronzemedaille-Avers-Signiirt.jpg

[https://www.picclickimg.com/00/s/MTYwMFgxMjAw/z/8UsAAOSwo4VdIfjk/\\$/Rikardo-Sulco-Grosse-Bronzemedaille-Avers-Signiirt-57.jpg](https://www.picclickimg.com/00/s/MTYwMFgxMjAw/z/8UsAAOSwo4VdIfjk/$/Rikardo-Sulco-Grosse-Bronzemedaille-Avers-Signiirt-57.jpg)

Okaze de tiu reta traserĉo mi trovis du aliajn informojn pri medaloj (mi ne estas kolektanto aŭ specialisto, do ne povas prijuĝi, ĉu tiu informo povus esti interesa al vi - eble jam konata):

En <http://www.bertin.biz/articles/archivesCER/1977-1991-Eo-Rennes.pdf> legeblas sur p. 50-51 pri iu medalo kaj sur p. 126 pri alia.

Amike,

Utho



23.09.2019 16:32

Madame, Monsieur,

Hier j'ai envoyé un message pour recevoir des information au sujet d'une medaille argenteé qui peut-être était produite dans les ateliers Flinois (Nom sur la medaille: A. Flinois). Je vous envoie deux photos de cet objet.

Je vous remercie d'avance,



Mag. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

30.09.2019 10:27

Bonjour,

Je vous remercie pour votre mail et pour ces photos.

Après quelques recherches, je ne retrouve aucune trace de ces éventuelles fabrications. Le nom correspond bien à celui de notre entreprise mais c'est un nom qui est assez fréquent dans le nord de la France, donc il s'agit probablement d'une autre famille.

Bien sincèrement,

Virginie Conty



30.09.2019 23:26

Kara Garry!

Ĉu vi jam havas novaĵojn pri la progresado de la preparado de la UK? Evidente mi estas ankaŭ scivolema pri la realigo de la tiuokaza medalo. Ĉu la projekto estos sukcesa?

Kun amikaj kaj numismataj salutoj,

Bert

07.10.2019 9:53

Saluton Bert,

Jes, ni ankoraŭ interesiĝas pri la presado de memormedalo por la UK. Ni baldaŭ afiŝos reklamon al nia Fejsbuka paĝo kaj al aliaj komunikiloj, por ke ni sciu pli malpli kiom da medaloj vendiĝos. Estus tro granda risko elspezi kelkmilojn da dolaroj sen iu ajn certeco ĉu ni povos vendi sufiĉe da ekzempleroj por ne fari malprofiton.

Eble vi afable povus sendi la reklamon ankaŭ al viaj membroj. Mi baldaŭ sendos al vi la tekston.

Amike,

Garry



A N O N C O J

&

E V E N T O J

Pola Retradio en Esperanto

[E elsendo el la 12.06.2019](#)

Junio 12, 2019 | Enretigita de [Barbara Pietrzak](#)

La 861-a E_elsendo el la 12.06.2019 ĉe www.pola-retradio.org



Jarkomence pasis la 90-a naskiĝdatreveno de unu el la plej konataj polaj esperantistinoj, plurjardeka redaktorino de „Heroldo de Esperanto”. Lige kun tio ni memorigas – ĉerpante el nia arkivo – sondokumentojn el la komenco de la 90-aj jaroj, kiuj proksimigas ĉi tiun elstaran virinon ankaŭ laŭ iom privata aspekto.

La komencaj aktualaĵoj rilatas al la vizito de la pola prezidenta paro en Usono kaj al partopreno de Pollando en la projekto pri superkomputilo. La sciencbultena temo koncernas la unian projekton LOFAR, kiu esploras la radioondojn.

La aktualaĵoj kaj la sciencbultena temo estas paralele legeblaj kaj aŭdeblaj en la koncerna rubriko de nia paĝo.

La programinformon ilustras foto de la Premio de Ada Fighiera-Sikorska, en 2018 atribuita al red. Barbara Pietrzak. La elsendo

troviĝas krome en jutubo ĉe la kanalo Espero2009: <https://www.youtube.com/results?q=pola+retradio&sp=CAI%253D>

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

14.07.2019 18:23

Kara Bert!

Por via informo kun elkora saluto!

Walter

Von: Leopold Patek **An:** Walter KLAG

Gesendet: Freitag, 12. Juli 2019 15:25

Betreff: Numismatiko

Kara Walter,
jen informo el Fejsbuko

[Maritza Gutierrez](#)
[Julio 10, je la 18:02](#) ·

La 9-an de julio oni festas en Kubo la tagon de la numismatiko, ĉar en sama tago de 1869 la Patro de la patrolando rajtigis la presadon kaj cirkuladon de monpapero.



uea.facila.org

[Numismatiko](#)

Ekde 2014 ekzistas fakgrupo en Esperantujo, kiu studas Esperantajn...

Amike,

Leo



La 105-a Universala Kongreso en Montrealo, Kanado

La 105-a UK

Montrealo — Kanado

1 — 8 de aŭgusto 2020



Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol kvin jaroj ĝis 133 individuaj membroj kaj 20 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi nur LAŬPETE tuj ricevos perrete ankaŭ ĉiujn jam aperintajn. SENPETE sekve ĉiujn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2018 sur p. 66-67. Se vi dezirus pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be!

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”